

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV



KATOLIKA SENTO

BOLLETTINO DELLA
UNIONE ESPERANTISTI
CATTOLICI D'ITALIA
(U.E.C.I.)

Anno 50° - 1971

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045 - 22.062
37100 VERONA

KATOLIKA SENTO

50 a JARO

n° 12 - decembro 1971

(Bollettino mensile)

LIBERECO KAJ RESPONDECO EN LA EKLEZIO

"Libereco kaj respondeco estas la atributoj aŭtentikaj kaj profundaj, kiuj karakterizas la membrojn de ĉi tiu originala societo, kiun oni nomas la Eklezio". Tion diris Paŭlo la 6-a, respondante al la demando de tiuj, kiuj el ekstere, aŭdinte multe paroli pri ĝi dum la Sinodo, demandas sin: sed kio estas la Eklezio? La scivolemo turniĝus bonvole al la problemoj pritrakitaj de la Sinodo, pri kiuj la publiko volus havi iun konkludan informon. "Ni lasu ankoraŭ - diris la Papo dum la ĝenerala aŭdienco (10/XI) -, ke laboru la teknikistoj, nome la personoj kompetentaj, komisiitaj doni logikan kaj doktrinan ordon al la oficialaj tekstoj aprobitaj, sed devigataj konsideri la multajn rimarkojn sugestitajn de la Sinodaj membroj. Ankoraŭ ne estas la momento, nek ĉi tiu verŝajne la sidejo, por respondi al ĉi tiu prava scivolemo".

Poste la Papo respondis la demandon pri la Eklezio. La Eklezio estas religia societo. Ni ne povas arogi al ni aparteni al la Eklezio, esti aŭtentikaj kristanoj, ne estante samtempe membroj de ĉi tiu societo, kiu nomiĝas Eklezio. "La kristanismo estas fakto socia. Ĝi ne estas nur ideologio, kiun ĉiu povas sekvi laŭ sia plaĉo aŭ gardi en la sekreto de sia konscienco. La religio praktikata de la Eklezio konsistigas komunumon, komunecon de penso kaj de moro; ĝi generas popolon, la popolon de Dio. La koncepto pri Eklezio ekskluzive

spirita, kaj tial nevidebla, nedeĉifrebla ekstere, ne interpretas integre la realon de la kristanismo".

"La Eklezio - pludiris la Papo - ne estas nur 'animo' ; ĝi estas ankaŭ 'korpo'. Eĉ la kristanoj, kiuj disiĝis de la Eklezio, kun la intenco krei alian nur spiritan kaj nevideblan, kaj tial ne submetitan al iu ajn socia devigo, ne subtenatan de iu ajn rilato ekstera kaj tial aŭtoritata kaj jura, komprenis, ke ili devojiĝis de la esenca penso de la religio fondita de Kristo, kaj ili volas atribui al si la titolon "Eklezio", dum ĝi postulas esti societo videbla, determinita, enkarniĝinta en homa organismo, kondukanta al la unueco".

La Papo aludis poste al tio, kio distingas la societon eklezian disde la societo civila. Al ĉi-lastaj ni apartenas laŭ naskiĝo, nome laŭ titolo, kiu ne dependas rekte de nia volo. Dum al la eklezia societo ni apartenas pere de la bapto, kiu supozigas en la baptita infano la kredon de la gepatroj, de la gebaptopatroj, de la komunumo; kaj kiu postulas en la konscia plenaĝa kristano "liberan kaj volitan kredoakton". La Eklezio estas ja societo, sed societo libera. Ne ekzistas kredo, se ĝi ne estas libera. Sed la termino "libereco", aplikita al la religia vivo, havas konstituan profundecon tute propran, kaj ne nur la agan signifon, kiun ni atribuas al ĝi en la vivo natura. "Tio - asertis Paŭlo la 6-a - igas la religian vivon, la vivon de la eklezio, ne nur inda esti kalkulata inter la unuaj kaj plej sanktaj homrajtoj, sed ekstreme grava kaj drama por ĉiu persono, kaj ankaŭ por la tuta homa kolektivo, meze de kiu la praktikado de tia libereco, decidiga por la supera destino de la homo, trovas praktike sian disvolviĝon. La Eklezio, do, prezentiĝas al ni kiel societo, en kiu la plena uzo de la homa libereco atingas siajn postulojn kaj siajn esprimojn plej altajn kaj plej kompletajn, ĉar la kredo, t.e. nia rilato kun Dio, suferas ne

niun tridon, neniun malhelpon".

La Papo je ĉi tiu punkto turnis la atenton al alia postulata eco gravega, komplementa por la libereco de la persona religia vivo, t.e. la respondeco. "En neniua alia homa kondiĉo ni trovo's la respondecon, kiu portas tiajn postulojn psikologiajn kaj moralajn, kiel en nia religio, en la Eklezio, tiel ke ĝi konsistigas la stimulon plej viglan, plej aŭtoritatan, plej konsolan de tiu nia akto spirita, esence humana, kiun ni nomas konscienco. Ĝi estas afero konata kaj travivata en la kristana moro. La infano ĝin eksentas, la homo ĝin travivas".

"Ĉi tie estas la fonto - konkludas Paŭlo la 6-a - de la dramo antikva kaj moderna; sed, dum hodiaŭ, laŭdeginte la konsciencon sen'san kaj psikologian, oni klopodas estingi la konsciencon religian kaj anestezi la konsciencon moralan, forigante, sed ne povante tute nuligi la nocion de peko, t.e. de totala respondeco antaŭ Dio, antaŭ la socio, antaŭ sia personeco, kaj tiel igi la liberecon ne respondeca antaŭ siaj superaj instancoj, la Eklezio sinregas sur ĉi tiu sento de respondeco, kiu eliĝas el ĝia libera kredo kaj igas ĝin kapabla agi en la amo, en la firmeco, en la viveco de la utiligo de ĉiu talento, je kiu povas esti riĉa la homa vivo".

RADIO ROMA-ESPERANTO

La programoj de la dissendoj restos ĉiam kiel en novembro, t.e.: Unua parto: "Novaĵoj el Italujo kaj kanzonoj en Esperanto"; Dua parto: "Kuriero de Esperanto". Sed oni atentu pri ia ŝanĝo de ondlongoj, kiuj nun estas: 30,90; 41,24; 50,03.

=====

CENTRO ESPERANTISTA
KATOLIKO ROMANO

100

BULTENA JUBILEO

Numero centa: jen jubil-evento
por la bulteno zorge redaktata,
sonanta je kristana pia sento,
meze de l' nuna viv' angoro-sata.

Ĝi fontis ĉe l' preĝejo Kristo Reĝo,
nun viglas ĉe la Ora Baziliko,
modesta voĉo, foje varma preĝo,
por la esperantista katoliko.

Migradas ĝi kun plej amikaj vortoj
tra l' vasta mondo daŭre sen kvieto,
frata parol' al malfeliĉaj sortoj,
legaj' edifa por spirit-asketo.

Vivu, bulten', por sankta pac-afero;
vin benu la Madono de l' Espero!

Romo, la 27an de novembro 1971a

Luigi Minnaja

ATINGO DE LA CENTA NUMERO ne estas ordinara evento en la vivo de monata periodaĵo, ankaŭ en la vivo de simpla bulteno, kiel tiu de la Roma Katolika Esperanto-Centro; tio donas al ni okazon kaj instigon rigardi mal antaŭen, al la plej signifoplenaj etapoj de nia agado.

La unua numero de la bulteno aperis en januaro de la 1961a. Pli ĝuste, ĝi aspektis kiel cirkulero, kaj tion, cetere, esplicite diris en la prezentaj vortoj la unua prezidanto de la Centro, Karlo Aŭgusto Kohler:

"Por pli fervora vivo kaj pli intensa agado de grupo, ki u jam hodiaŭ estas sufiĉe multnombra, sed kiu povas konsiderinde plivastiĝi, ne sufiĉas la ĉiudimanĉa kontakto, kiun pluraj ne povas ĝui, kaj oni bezonas alian komunikilon, cirkuleron sendotan hejmen, kiu informu pri nia agado kaj starigu ligilon".

La mencio de "grupo jam sufiĉe multnombra" memorigas nin, ke antaŭ kelkaj monatoj (la 30an de oktobro 1960a oficiale, sed fakte jam la 15an de majo 1960a) es tis renaskiĝinta la Roma Katolika Esperanto Centro, danke al la fervoraj klopodoj de p. Giacinto Jacobitti kaj kelkaj aliaj entuziasmoj. Komence, la kunvenoj okazas dis ĉe la preĝejo "Kristo Reĝo", en kies kriptono celebris la meson. Escepte, mesoj okazis por la Centro en la preĝejo "Senmakula Virgulino" (omaĝe al Nia Sinjorino de la Espero, protektantino de la katolikaj esperantistoj, kaj en la baziliko "S. Maria Helpantino" (aŭ spicie al la Eŭropa Unuiĝo). De la 2a de februaro 1969a la mesoj okazas en la baziliko S. Maria la Granda", kaj la kunvenoj en la Pontifika Orienta Instituto.

Krom pastro Jacobitti, pluraj aliaj diverslandaj sacerdotoj celebris la meson por la Centro; ni citas la e piskopojn Alfred Pichler (Jugoslavio), J.A. Coimbra (Bra^zilo), kaj Eduard Macheiner (Aŭstrio); kaj pastrojn Thalmajer (Okc. Germanujo), Toloza (Ĉilio), Klimowicz

(Aŭstralio), Huitbertus (Aŭstrio), Paruzel (Pollando), Urbajtis (Litovio), Ciccanti (Italujo). Sed la plej nefor_geseblan memoron lasis sendube pastro Carlo Cecchi_telli, kiu por la esperantistoj celebris sian unuan me_son, la 19an de marto 1961a.

Komence la meso okazis en latina lingvo; kelkaj par_toj estis legataj ankaŭ en Esperanto, kaj same en Espe_ranto okazadis la homilio.

La 12an de septembro 1965a dum la esperantista pil_grimado al la Sankta Lando, okaze de la inaŭguro de la panelo de "Patro nia" (pri kiu la bulteno amplekse ra_reportis, patro Jacobitti celebris en Ain Karem apud Je_rusalemo la unuan meson kun partoj esperantlingvaj o_ficiale aprobitaj (kvankam nur "eksperimente") de la S. Seĝo mem. Temis pri la unua paŝo. La 21an de aprilo 1966a papo Paŭlo VI rajtigis uzadon de Esperanto en la legaĵoj kaj en la preĝoj de la fideluloj; kaj pli poste ve_nis rajtigo por celebrado de la meso tute en Esperan_to. La Roma Katolika Esperanto Centro tiel fariĝis la unua grupo en la mondo, kiu regule havas mesontute en Esperanto.

Pri aliaj gravaj eventoj en la vivo de la Katolika E_speranto-Movado oni povas legi en la ĝisnunaj 100 nu_meroj de nia bulteno, kiu ek de januaro 1970a aperas, kunlige kun "Katolika Sento" en pli inda kaj alloga ve_sto.

Ni menciias kelkajn el tiuj okazintaĵoj: la streĉaj klopodoj por prizorgi kaj viviĝi la katolikan revuon en Esperanto "Nova Civito"; la memorinda Internacia Ka_tolika Esperanto-Kongreso en Rocca di Papa apud Ro_mo (aŭgusto 1962a); la celebradoj de la 50a datreveno de la elekto de Nia Sinjorino de la Espero kiel Protek_tantino de la Katolikaj Esperantistoj (1963a); la kampa_njo por enkonduko de Esperanto ĉe la Vatikanan Radi_on; la ĉiujara "Sermono de la Nacioj"; la vizitoj al

kard. Beran kaj Yu Pin; la granda pentraĵo de la Madono de la Espero; la impona laboro de pretigado de mestekstoj en Esperanto kaj de Katolika Terminaro; la dolorigaj disputoj kun la iamaj estraranoj de IKUE (kio kaŭzis, interparenteze, faktan transformiĝon de la Centro de "Romo" al "Internacia", kiel oni povas konstati legante la nomojn de la pli ol 400 membroj); la unua geedziĝo kaj la unua baptoceremonio tute en Esperanto.

De novembro 1968a la bulteno komencis raporti pri la okazintaĵoj en la katolika eklezio, ankaŭ sendepende de rilato al Esperanto. Tio renkontis la favoron de la legantaro, tiel ke oni dediĉis ĉiam plimulte da spaco al tiu informado; kaj tiamaniere la bulteno ŝanĝis sian karakteron, de por-esperanta al per-esperanta informilo en faka sektoro.

Rigardante la 100 numerojn ĝis nun aperintajn, oni sincere miras, ke tiom da laboro sukcesis direkti praktike, unu sola homo, patro Giacinto Jacobitti, al kiu i-ras, do, nia varma danko, kaj samtempe gratulo por pli a fruktodona agado.

Antonio De Salvo

BONFARA KASO. Jam de diversaj jaroj ni kutimas fari bonfaran agadon por Pakistano (lastfoje, en oktobro, ni sendis ankoraŭ kvindek mil lirojn: v.p.238); krome, okaze de Kristnasko kaj de Pasko ni faras ion similan interne de nia samideana familio. Jen proksimiĝas Kristnasko. Kiu volas partopreni?

Lastaj oferintoj: Skorupa R.:5.000; Libutti D.:500; R. Galeotti:1.000; A. Signore:7.500. Entute: 14.000.


ALIĜIS AL UECI-CECR por 1972 (Dua listo): Romo: A. Biani; I. Galiardi; A. De Salvo; G. Viti; Ascoli P.: L. Gabrielli; Biella (VC): C. Cerri; Mantova: N. Dell'Aringa; Rho (MI): N. Minnaja; Priacco (TO): P. Orso; Vercelli: L. Sola; Brazilo: T. Maciel; Britujo: J. F. Twilley;

The Brit. E. A. ; Ĉeĥoslovakio: M. Lorková; Ĉinio: "El Pola Ĉinio"; Francujo: E. Thiollière; Hispanujo: I. F. Soler Sempere; Jugoslavio: L. Kiš; Nederlando: P. Gene-sis; C. Preller; Pollando: F. Walas; A. Gucwà; Portuga-lujo: G. Pausback; A. De Moura. Entute: 101.

Pastroj, kiuj intencas aliĝi, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre dirite - sedes tas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bul tenon, petu de p. Jacobitti senpagan sendadon.

Ni donas la liston de niaj abonintoj, kiu valoras kiel a testilo pri aliĝo de la enskribitoj. Se vi ne trovis anko raŭ vian nomon en la listo, bonvolu tuj aliĝi por ne riŝ ki haltigadon en la ricevo de via bulteno.

NOVA FUNEBRO ĈE LA ITALA Esperantistaro: mortis adv. Boscarino! Kun profunda doloro ni eksciis, ke la 21an de l' pasinta oktobro forpasis en Raguso (Sicilio), post dekkvintaga malsano pro trombozo, je la aĝo de 72 jaroj, advokato Giuseppe Stanislao Boscarino, pioniro de Esperanto en Italujo, delegito de UEA kaj nia bona, kara amiko. La 21an de novembro, trideka ta go de lia forpaso, kuniĝis multaj romaj samideanoj par toprenante en la meso celebrita de p. Jacobitti por la a nimripozo de la fidela membro de nia katolika grupo, kaj por aŭskulti el la vortoj de Luigi Minnaja la fune bran memorigon. Li naskiĝis en Raguso en la jaro 1899a kaj lernis la Internacian Lingvon en 1913a. Li trè aktivis precipe post la dua mondmilito. En 1945a li fon dis kaj estris ĝis 1962a la Sicilian Delegacion de la Ita la Esperanto-Federacio; brile propagande prelegis en



pluraj urboj de la insuloj; gvidis multajn kursojn kaj fondis grupojn kaj katedrojn. Li organizis kvar regionajn kunvenojn kaj prezidis en 1958a la Organizan Komitaton de la 29a Itala Esperanto-Kongreso en Palermo; klopodis kun sukceso por la nomigo de Esperanto-stratoj en kelkaj siciliaj urboj. Li, kiel unua, sukcesis prezentigi de senatano Moltisanti al la Itala Parlamento leĝproponon por enkonduko de Esperanto en lernejojn. Ĉion li faris fervore, inteligente kaj malavare. Speciale li interesiĝis ankaŭ pri la Esperanto-filatelio, eldonante en formato de poŝtkarto la reproduktion de ĉiu unuopa Esperanto-poŝtmarko, kaj eldonis plurajn aliajn bildkartojn, glumarkojn kaj faldprospektojn en la Internacia Lingvo. Li korespondis kun multaj gesamideanoj en la mondo.

S-ano Minnaja reliefigis, ke la alta religia sento de Boscarino havis certe grandan influon en lia esperan-

tista celo: al tio li estis atentigita per la vortoj diritaj en la 1909a de sankta Pio 10a: "Esperantò havas antaŭ si grandan estontecon" kaj ĉe alia okazo: "Esperanto povos esti valora ilo por atingi la unuecon inter la katolikoj de la tuta mondo". Fakte, en la unua paĝo de lia esperantista albumo li metis en honorlokon la bildon de la sankta papo kun surskribita la profeta frazo, kaj la foton de sac. Di Giacomo, kiu instruis Esperanton al li, 14-jara kaj same al lia patro kuracisto, d-ro Francesco. Inter la altaj atestoj, kiujn li ricevis pro siaj agadoj, menciinde estas, ke li estis insignita per la titolo de komandoro ne nur de la Itala Respubliko, sed ankaŭ de la Sankta Seĝo. Merite de li kard. Ruffini, kiu en sia junaĝo lernis Esperanton, aliĝis denove al la esperantista movado. Kaj li ame kolektis kaj ĉiujare bindigis nian bultenon, pri kiu li havis ĉiam kuraĝigan, varman konsenton. La emociaj vortoj de s-ano Minnaja montris al la aŭskultantoj, kiom valora estis la agado de Boscarino en nia movado, kaj kiom grandan ekzemplon li lasis al la katolikaj esperantistoj.

TRISTA SICILIA AŬTUNO

Amata tero, suna Sicilio,
 kie parfume citronujo floras,
 kaj inter densa verdo de l' folio
 flambriletante la oranĝo oras!

Pri vi kor-arde digna fil' sopiris;
 per li tra landoj mita ĉarmo via,
 mistere rava, la atenton tiris,
 kaj helpis l' idiom' internacia.

Aŭtuno trista venis kun doloro;
 sur la horloĝo de la tera vivo
 sonoris sen kompat' la lasta horo:
 la kor' rompita haltis ĉe l' deklivo.

En vi nun, forrabita de l' destino
 eterne dormas Slao Boscarino.

Luigi Minnaja

PREZIDENTO JONAS kaj esperanto en Romo. La okazon de la oficiala vizito al Romo de la Prezidento de Aŭstrujo, Franz Jonas, (disvolviĝintan de la 15a ĝis la 17a de novembro 1971a) la italaj esperantistoj profitis por kontakti kun li kaj samtempe diskonigi alla ne esperantistaj medioj la fakton, ke ŝtatestro konas kaj uzas la Internacian Lingvon. Tiun kontakton ili facile atingis pere de la Aŭstria ambasado en Romo.

Jam la 15an posttagmeze, kiam, post lia alveno al la flughaveno, survoje al la Kvirinalo, la urbestro de Romo prezentis al li la saluton de la civitanoj apud la Koloseo, grupo da lokaj gesamideanoj aklamis lin, arigitaj sub longa tolostrio kun verda stelo kaj la skribaĵo "Roma Esperanto-Grupo - Bonvenon al Franz Jonas". Kaj la Prezidento, el la malfermita aŭtomobilo, respon

dis al ili per mansigno kaj per la vortoj "Saluton al vi!"

La 16an vespere delegacio el dek gesamideanoj, sub la prezido de inĝ. Giordano Azzi, Prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio (tiucele fluginta al Romo) estis invitita al la oficiala akcepto, per kiu Jonas rĉiprokis la vespermanĝon al li proponitan de la Itala Prezidento Saragat la antaŭan vesperon. Dum tiu kunveno, tre riĉe disvolviĝinta en "Grand Hĉtel", kaj kiun partoprenis multegaj eminentuloj, du lokaj samideanoj interŝanĝis ke lkajn vortojn en Esperanto kun la Prezidento de Aŭstrujo, kiu montriĝis al ili tre afabla.

La 17an vespere, en la sama hotelo, okazis tute privata aŭdienco por esperantista delegacio, kiu - gvidata de la Sekretario de la Roma Grupo, d-ro Renato Corsetti - je nomo de la Itala Esperantistaro omaĝe prezentis al Lia Moŝto Jonas ekzempleron de la "Dia Komedio" en Esperanto. Dum tiu aŭdienco, kiu daŭris preskaŭ duonhoron, la Prezidento kore kaj familiare konversaciis kun la kunvenintoj, interesiĝante pri la itala kaj loka movado, kaj parolante pri sia esperantista vivo komenciĝinta antaŭ 50 jaroj en laborista organizaĵo, pri sia iama gvidado de kursoj, pri korespondado siakaj de sia edzino kun la tuta mondo en la Internacia Lingvo. Kun granda intereso li foliumis la Dian Komedion kaj libreton kun versaj tradukoj de Azzi el la itala poeto Pascoli.

Antaŭ la disiĝo, legis al li porokazan omaĝan soneton samideano Luigi Minnaja, kiun li varme dankis kaj gratulis. Poste, manpremante unuope la ĉeestantojn, li petis ilin transdoni liajn salutojn kaj dankojn al ĉiuj itaj laj esperantistoj.

C. M.

SALUTO AL PREZIDENTO JONAS

Aere ŝvebas sento de konkordo,
 regas agrabla nova harmonio,
 rezulto de serena kunakordo:
 bonvenon, ho Najbaro el Aŭstrio!

Heroldo bona de la paco vera,
 parolo Via estos ja fekunda,
 ĉar akceptata de anim' sincera;
 kaj amikeco iĝos pli profunda.

Al Vi nin ligas monda idiomo,
 al kiu Vi dediĉis Vin elane;
 ni nun Vin festas en l' eterna Romo,
 simple, de kor' al kor', samideane .

En Esperanto, kiu dolĉe sonas,
 ni Vin omaĝas, Prezidento Jonas!

Romo, 16-11-1971

Luigi Minnaja

ESPERO KATOLIKA, la monata organo de IKUE, re-
 aperis en nova aspekto sub la nova estraro. Ĝis nun
 ni ricevis kvin numerojn: la malfacila momento de le re
 novigo de la estraro kaj de la redaktoro samtempe kre
 is por ĝi seriozajn obstaklojn; sed jam la septembra nu
 mero (ĝis nun la lasta) ŝajnas pli bone aranĝita, kvazaŭ

ĝi trovis jam nun sian ĝustan linion. La ekstera aspekto, verŝajne iom tro severa, ricevos tute novan veston ekde la 1972a jaro. Plaĉis al ni, ke la unua numero komenciĝis per preĝo al Maria. Tiel la bulteno intencis sin meti sub la protekton de la ĉiela Patrino, kiel garantiaĵo de sukceso. Dum la unua numero (Aprilo-Majo) prezentas la IKUE-prezidanton, sac. F. Longoni, jam konata de la legantoj de K.S., la septembra numero havas la foton de la nova redaktoro, sac. Felice Natale Ruaro, parokestro de Kostermano, apud Verono. Kun ĝojo ni salutas la novan junecon de la glora revuo, kvan kam ĝi havas 67 jarojn, bondezirante al la IKUE-estaro, kiu ĝin inspiras kaj kontrolas, kaj al la vigla redaktoro la plej merititan sukceson.

ĜOJIGA INFORMO POR ĈIUJ ESPERANTISTOJ: ni konsentis kun la Hungara Esperanto-Asocio kunhelpi por la eldono de la romano: "La sklavoj de Dio", hungare verkita de Gàrdonyi (+1922a), kaj tradukita de D.ro Johano Hamvay. La aŭtoro estas la fama hungara romanisto, kies verkojn la Hungara ŝtato decidis eldoni kiel gemojn de la hungara literaturo. La romano temas pri S. Margarita (1207-1221), filino de la hungara reĝo Bela IV. Ŝi estis dediĉita de la gepatroj antaŭ sia naskiĝo, al Dio por la savo de la hungara nacio. Kaj ŝi, fidela al tiu voto, vivis ek de sia infanaĝo en dominikana monakinejo, kie ŝi mortis je la aĝo de nur 24 jaroj, mirigante la mondon pro sia sankteco. Ni, kiuj legis en la esperanta traduko la verkon, devas agnoski, ke ni estis vere ravitaj de ĝia beleco. La tradukita verko aperos sendube inde inter "Quo vadis", "La Faraonoj" ktp., la plej famaj romanoj tradukitaj en Esperanto.

.....
 El Romo, centro de la katolika mondo, kelkaj informoj
 pri la vivo kaj la agado de la eklezio.

LA VIZITO DE LIA SANKTECO Jakoub III, siri-ortodo-
 ksa patriarko de Antiokio al Paŭlo VI, estis taksata ki
 el tre grava en la klopodoj, kiujn oni faras laŭ diversaj
 direktoj, cele al unuigo de la kristanoj. La 24an de ok-
 tobro la patriarko de Antiokio, ĉefo de la siri-ortodo-
 sa eklezio, kun sia sekretario kaj tri episkopoj, vizi-
 tis oficiale la papon, kiu akceptis lin kun tute speciala
 honora protokolo. Post kiam Paŭlo VI parolis private
 kun li en sia studoĉambro, li akceptis ankaŭ la sekvan-
 taron. Flanke de la papo estis kard. Villot, ŝtata se-
 kretario kun sia anstataŭanto, mons. Benelli, la sekre-
 tario de la konsilio por la publikaj aferoj, mons. Casa-
 roli, kard. Willebrands, prezidanto de la sekretariato
 por unuigo de la kristanoj, kaj la sekretario de la kon-
 gregacio por la orientaj eklezioj, mons. Brini. Post a-
 fabla interparolo kaj interŝanĝo de signifaj donacoj, ĉi-
 uj kune iris al la papa kapelo, dediĉita al S.ta Matil-
 da, kie oni preĝis kune per la kanto "Veni Creator", le-
 gaĵoj el la letero de S.ta Paŭlo al la Filipianoj kaj re-
 cito de preĝoj el la siriortodoksa liturgio. Fine oni re-
 citis preĝon "Patro nia". La preĝoj estis kunligitaj al
 paroladoj, kiuj liberigis ilin de ĉia malvarma oficiale-
 co. Patriarko Jakoub III reliefigis la gravecon de la ren-
 kontiĝo, la unua post 15 disigaj jarcentoj, en klimato de
 amo kaj frateco. "La du eklezioj, li diris, klopodos pri-
 serĉi videblan unuecon pli kaj pli grandan, ĉiu religie
 gardante sian individuecon, por la progreso de la dia
 regno". Kaj ankaŭ Paŭlo VI rimarkis, ke kvankam en la
 rilatoj estis lumoj kaj ombroj, kaj kvankam ĉiu estas
 gvidata de la sincera deziro de fideleco al sia tradicio
 ricevita de la patroj, oni priserĉos ĉiam fervore la e-

fektivigon de la plena reciproka komuneco. La postan tagon la papo kun la patriarko denove renkontiĝis en la malnova aŭlo de la Sinodo kun ĉeesto de multaj sinodaj patroj. La komuna deklaro unue temas pri danko al Dio, kiu permesis en tiu historia evento de la du eklezioj preĝi kune kaj atesti la ŝinceran deziron de unueco. Poste reliefigante la komunajn religiajn trezorojn, pri sakramentoj, pri kredo laŭ la apostola doktrino, pri patroj kaj sanktuloj, inter kiuj Cirilo el Aleksandrio, la deklaro agnoskas, ke la Sankta Spirito daŭrigis sian sanktan gracon al la eklezioj, eĉ kiam ili estis sub la influo de la homa malperfekteco. Sed forpasis la tempo de la reciprokaj riproĉoj kaj kondamnoj, kaj nun oni klopodas sincere forigi la obstaklojn al kompleta komuneco.

LA DEKNAŬA ASEMBLEO de la italaj Ĝeneralaj kaj Provincaj superulinoj (USMI) disvolviĝis en Romo de la 28a de oktobro ĝis la 4a de novembro. Partoprenis en ĝi preskaŭ 500 superulinoj. Kard. Ildebrando Antoniutti, prefekto de la kongregacio por gereliĝiuloj, malfermante la laborojn, atentigis la asembleon pri la instruoj de la eklezio, entenataj en la papa dokumento "Evangelia atesto", kiu fariĝis la ĝenerala temo de la tuta semajno, kaj invitis al la direkta unuiĝo de ĉiu instituto por pli efika servo al la komuna bono. Fakuloj pritraktis la diversajn branĉojn de la aktiva vivo ĉe religiulininoj, precipe flegadon de malsanuloj, sociajn servojn, kunigante enprofundigon de la plej konkretaj kaj urgaj apostolaj problemoj al la specife doktrinaj. La Unuiĝo de la religiaj superulinoj, kiu naskiĝis laŭ la direktivoj de Pio XII, montriĝis pli kaj pli taŭga pro kunordigo de la agadoj en la rapide evoluiganta niatempa vivo.

EN NAPOLO DE LA 9a ĝis la 12a de novembro oni celebris la Ĝeneralan Asembleon de la plej altaj superu-

loj de la viraj ordenoj, el kiuj dependas 49.000 religiuloj. Kard. Ursi ne povante partopreni, komisiis sian ĝeneralan vikarion, mons. Antonio Zama, estri la malfermon. Oni pritraktis la gravajn problemojn, cetere abunde prilumitajn jam en la Sinodo laŭ tuteklezia skalo, kaj oni pristudis konkretajn rimedojn aŭ eksperimentojn, proponante fruktoriĉajn spertojn de kelkaj religiaj familioj.

DUM LA TRIA KONGRESO de la Asocio "S. Benedikto Patrono de Eŭropo" prelegis kard. Danielou per parolado titolita "Hieraŭ kaj morgaŭ de Eŭropo". La oratoro prilumis la kontribuon, kiun kredo kaj religio donis al la eŭropa civilizacio, laŭgrade disvastigita tra la tuta homaro. Ili estas do ne nur eŭropaj, sed tiuj universalaj valoroj, kiuj donis klerecon, grandecon al Eŭropo kaj lumon al la mondo. Fakte, la grandaj fondintoj de la eŭropa unueco, la patroj de Eŭropo, estas la samaj patroj de la eklezio: Aŭgusteno, Leono la Granda, Gregoro la Granda, Benedikto. Ili estis la evangelizantoj de la naskiĝintaj eŭropaj nacioj kaj tiuj, kiuj metis la fundamentojn de la eŭropa kulturo, unue savante diligente el la blinda detruo de la barbaraj invadoj la riĉaĵojn de la pasinta literaturo, atesto de antikvaj glo-raj civilizacioj, poste kreante lernejojn kaj universitatojn. Sed sankteco, religio, kredo, estis la bazoj de tiuj grandaj idealoj. Danielou, rimarkante, ke hodiaŭ ĉe multaj teologoj oni volas pridiskuti ankaŭ la fundamentojn de la kredo, konkludis: "Necesas, ke ĉiuj, kiuj kredas je misio de la eklezio por la kulturo, zorgu pri ĉiuj kontaktoj, kiuj ebligas influon en la historio. La historio apartenas ĉiam al tiuj, kiuj nepre kaj kuraĝe volas barakti por atingi idealon."

DON ALBERIONE, FONDINTO de la "Pia Societo Sankta Paŭlo" (P.S.S.P.) mortis en Romo la 26an de no-

vembro. La papo mem vizitis la mortontan malsanulon. La P.S.S.P. artikiĝas laŭ sep diversaj religi^uiaj institutoj, kiuj havas entute 1.445 religi^uulojn kaj 6.000 religi^uulinojn, laborantajn en ĉiuj kontinentoj, ĉefe en la propagando de la dia vorto. La itala "Famiglia Cristiana", semajna revuo eldonita de la P.S.S.P., atingas 2 milionojn da ekzempleroj. Lia devizo estis: "Kun la papo kaj kun la eklezio".

LAŬ INICIATO DE LA KATOLIKA itala ĵurnalo "Avvenire", la 27an de novembro estis donitaj al la papo sumon de pli ol 70 milionoj, kolektitaj inter la legantoj, por helpo al Pakistano.

BERGAMO KONSENTIS ĜOJE al la beatigo de papo Johano. Tio montriĝis evidente, okaze de la publika sesio, kiun la dioceza tribunalo havis en la paroko de "Sotto il Monte", plenplena de aŭtoritatoj kaj kredantoj. Temas nur pri la unua etapo, ĉar la definitiva vorto apartenas al Romo; sed klare estas, ke la dokumentaro el 1.300 paĝoj, enhavanta la atestojn kolektitajn en Bergamo, estas tre signifoplena. Sed tiu dosiero transdonita de la ĉefepiskopo de Bergamo, mons. Gaddi al la postulatoro de la kaŭzo, patro Antonio Cairoli, por ke li portu tion al la Vikariejo de Romo, estas nur unu el la multaj aliaj faritaj en la diocezoj de Clonfert, Akvisgrano, Sofio, Ateno, Istanbulo, Asizo, Oristano, Napolo, Raguso, Venecio. Dume oni atendas ankoraŭ la aliajn el Torino, Viĉenzo, Lisbono kaj Parizo. De la 18a de novembro 1965a, kiam estis anoncita de Paŭlo VI dum la Koncilo, la beatiga proceso de papo Johano, forpasis nur 6 jaroj, sed la kaŭzo multe progresis.

FRATO MAX ESTAS REPRESENTANTO de la komunumo de Taizé ĉe la Sankta Seĝo. Tion anoncas komuniko de la religi^ua komunumo, en kiu oni asertas, ke jam de longe oni decidis tion. Frato Max, aŭtoro de diversaj

teologiaj studoj, kontaktos precipe kun la Sekretaria-to por la unuiĝo de la kristanoj.

LA "RIMARKINDA PROGRESO" de la dialogo inter an-glikanoj kaj katolikoj dum la lastaj kvin jaroj estis re-liefigita ankaŭ de la papo en parolado adresita al du-dek membroj de la estrarkonsilio de la anglikana cen-tro en Romo. "Jam pasis kvin jaroj, diris la papo, de kiam ni paroladis la unuan fojon al vi esperplene, oka-ze de malfermo de la Centro, ne malmulte post la ak-cepto de la ĉefepiskopo de Canterbury, Mikaelo Ram-sey; eŭento, li aldonis, kiu estas ankoraŭ varma en nia memoro. Dum ĉi tiuj jaroj la dialogo evoluiĝis kaj fariĝis simbolo kaj esprimo de la komuna klopodo por la unueco de la kristanaro kaj frukto de pli granda in-terkompreno kaj amo. Ni neniam ĉesas danki la komu-nan Patron pro la graco donita al ni, ke ni povis ĝui ĉi tiun esperon, kaj ke ni havis ĉi tiun aspiron; ankaŭ pro la konstanteco kaj la saĝeco, kiujn li donas al ĉi-uj, kiujn li vokis al tiaj sanktaj klopodoj". Paŭlo VI ko-nkludis benante la laborojn de la Centro kaj de la in-ternacia komisiono.

LA AGENTEJO por misiaj informoj (AIMIS) donas la jenajn statistikojn pri la religioj en la mondo: Tutmon-da loĝantaro: 3.509,290.000; Katolikoj: 690.442.000; Protestantoj: 280.000.000; Ortodoksoj: 150.000.000; Musulmanoj: 480.000.000; Induistoj: 430.000.000; Konfuĉanoj: 376.000.000; Buddistoj: 176.000.000; Ŝintoistoj: 73.000.000; Taoistoj: 56.000.000; Hebre-oj: 15.000.000; aliaj religioj (animismo, ktp.) 782.858.000. Laŭ kontinentoj: Eŭropo: 685.378.000 da loĝantoj; katolikoj: 279.044.000; 40,7 %; Norda A-meriko, respektive: 224.305.000; 56.744.000; 30 %; Latina Ameriko: 274.767.000; 265.632.000; 96 %; Afriko: 345.700.000; 36.900.000; 10,7 %; Azio:

1.960.292.000; 47.863.000; 2,4 %; Oceanio:
 18.848.000; 4.259.000; 22,6 %. En Eŭropo en 1950a
 estis 250.900 pastroj kaj 749.500 religiuloj; en
 1970a respektive: 264.354 kaj 762.017; en la norda
 Ameriko, 1950a: 61.395 kaj 246.000; 1970a: 75.183
 kaj 295.247; en la Latina Ameriko, 1950a: 27.552
 kaj 94.500; 1970a: 44.791 kaj 148.206; en Afriko,
 1950a: 10.130 kaj 20.450; 1970a: 16.438 kaj 47.252;
 en Azio: 1950a: 10.657 kaj 16.943; 1970a: 26.932
 kaj 85.581; en Oceanio, 1950a: 3.250 kaj 14.000
 1970a: 5.453. kaj 22.267.

LA EKLEZIO DE Sud-Sudano post la grava bato pro
 la forpelo de ĉiuj eŭropaj misiistoj, dekretita la 29-an
 de februaro 1964a en Kartumo, klopodas restari ĝi.
 El la 60 grandaj misistacioj forlasitaj de la misiistoj
 (118 Kombonanoj, 12 de Mill Hill, 98 "Piaj Patrinoj
 de la Negreco", entute 214) nur dek ankoraŭ funkci-
 as, helpe de unu episkopo, du apostolaj administran-
 toj kaj 27 sacerdotoj, ĉiuj sudanoj. Ekzistas do la A-
 postola Vikariejo de Wara por 5 stacioj el la 18 iam
 laborantaj, kun episkopo kaj 15 sacerdotoj; la Ap.Vik-
 de Giuba (3 stacioj el la antaŭaj 18), kun Ap.Admini-
 stranto kaj 8 sacerdotoj; la Ap.Prefektujo de Mala-
 kâl por 2 stacioj el 8, kun Administranto kaj 4 sacer-
 dotoj. Ses stacioj de la Ap.Vikariejo de Rumbek kaj
 10 de la Pref. de Mupoj estis entute forlasitaj.

LA UNUA ELDONO kun eklezia aprobo de ekumena Bi-
 blio aperos en Ĉikago novembre. Unue ĝi aperas nur
 en la hispana lingvo. Por ĉiu libro de la Sankta Skri-
 bo ĝi havas enkondukojn de fakuloj el la kvar plej vas-
 taj konfesioj, kiuj ĝin agnoskas (katolika, protestanta,
 ortodoksa kaj hebrea), prezentataj unu flanke de la a-
 lia, en la sama paĝo, tiel ke oni povas tre facile kom-
 pari ilin kaj rimarki analogiojn kaj diversecojn. Tra

dukoj en la angla, portugala, itala kaj franca lingvoj estas en preparo. La spertuloj, kiuj zorgis pri la enkondukoj, estis gvidataj de la amerika jesuito p. Walter Addot, de la Centro por interkonfesia kunlaboro en la biblia kampo, ĉe la Sekretariato por unuiĝo de kristanoj. La katolika komento en ĉi tiu ekumena biblio estis farita de la madrida patro Alonso Schokel, el la Pontifika Biblia Instituto, kaj de la Iraka d-ro Stanley B. Marrow; la protestanta estis farita de profesoro Alberto Soggiu kaj Bruno Corsari; la ortodoksa, de profesoroj Nikolaus Panaglotis Bratsiliatis kaj Theodore Stylianopoulos; la hebrea, de rabeno Samuel Sandmal.

MONS. ARNS, ĉefepiskopo de S. Paŭlo en Brazilo donis siajn bienojn por konstrui dometojn al malriĉuloj. Lia tereno estos dividita laŭ 200 malgrandaj partoj kun dometo kaj malgranda ĝardeno por ĉiu. Samkvanto da familioj, per tre malgranda lupago akiros fine decan loĝejon. La urbo S. Paŭlo havas nun 8,1 milionojn da loĝantoj, kaj kreskas ĉiujare je 5,4 %; oni kalkulas, ke en la 1980a ĝi atingos 12 milionojn da loĝ.: sed, kompreneble, temas pri ĥaoza pliigo, kiu favoras senlaboron kaj konstruon de multaj barakoj en la ĉirkaŭaĵoj de l' urbo. La decido de la ĉefepiskopo celas doni ekzemplon, por ke aliaj ekleziaj komunoj de la urbo kuraĝu entrepreni la plej taŭgajn solvojn por helpi ĉi tiun amason da malriĉuloj. Mons. Arns diris, ke sia agado estis respondo al la alvoko de kard. Maurer, ĉefep. de Sucre (Bolivio), kiu celis meti je dispono de malriĉuloj la ekleziajn kaj la personajn riĉaĵojn.

TRI UNIVERSITATAJ fakultatoj, ĵurnalo kaj socia centro titolita al Paŭlo VI estas kelkaj el la imponaj iniciatoj enkondukitaj el la Salesa teritorio de "Mato Grosso" en Brazilo. Bazo de ĉi tiu entrepreno estas la "Ko

legio - Don Bosco", kiu havas 2.000 studentojn: 500 frekventas la elementajn lernejojn; 400 la gimnazion, 400 la superan lernejon kaj 700 tri universitatajn fakultatojn. Ĉi tiuj, fonditaj kaj direktitaj de kvin salesianoj, rilatas literaturon, filozofion, juron kaj ekonomiajn sciencojn. Oni preparas du kromajn fakultatojn, por obteni de la registaro, kiu postulas minimume 5 fakultatojn por starigi ateneon, la rajton pri katolika universitato. Alia grava entrepreno estas la publikado de "Ĵurnalo de la Komerco", unu el la kvin ĵurnaloj ekzistantaj en la vasta regiono de Mato Grosso. Tiu ĵurnalo estas kunigita al radielsenda stacio por la kampara industria instruado. Ambaŭ entreprenoj, enkondukitaj de la episkopo de la "Granda Kampo", mons. Barbisa, montriĝis gravaj rimedoj por la apostola agado en la teritorio. En la centro de sep vilaĝoj tre malriĉaj, oni kreis ankaŭ la "Socian Centron - Paŭlo VI", same direktitan de la Salesianoj, por flegado de malsanuloj kun kursoj pri pediatrio, pri kuirarto kaj higieno. Rimarkinda por studo de la regiono kaj etniko estas la "Indiana Muzeo" kaj la "Borora Enciklopedio", impona entrepreno, jam proksima al plenumiĝo.

PAŬLO VI elektis episkopo de Paramaribo, diocezo de Suriname (Nederlanda Gvajano) mons. on Luizon Zichem redentoranan pastron, kiu anstataŭos la nederlandan mons. Stefanon Kujepers, demisiintan pro atingita aĝlimo. Mons. Zichem estas la unua aŭtoktona sacerdoto de la lando, kiu estis elektita episkopo.

LA LOĜANTARO DE la Latinamerika kontinento atingis la nombron de 285 milionoj kaj kreskas laŭ 2,9 % po jare. Sed la 50 % vivas ankoraŭ en pajlaj kabanoj; la meza ĉiujara individua enspezo estas tre malalta, kaj analfabeteco estas tre vasta precipe en Bolivio,

Haitio, San-Salvadoro, Brazilo kaj Peruo. En la latina Ameriko vivas pli ol triono de la tutmonda katolikaro, sed la nombro de la pastroj estas nur la dek procentoj de la tutmonda klerikaro (45.000). Oni kalkulas, ke en la 2000a la Latinamerika kontinento havos la duonon de la tuta katolika popolo. Vokiĝoj mal kreskas: dum la lastaj ses jaroj pli ol 4.000 seminarianoj forlasis la seminarion. La sacerdotoj ordinitaj en 1959a estis 580; en 1969a, 689; tio ŝajnas kresko, sed fakte ne estas tiel, ĉar en la sama periodo la loĝantaro kreskis je 42 milionoj. Al ĉi tiu problemo aldoniĝas tiu de la eksterlanda klerikaro: preskaŭ 40 %, kiu renkontas diversajn malfacilaĵojn en la plenumo de siaj servoj. La hispana klerikaro estas la plej nombra en tiu kontinento; dum ĵusa renkontiĝo por la studo de ĉi tiu problemo, oni konkludis, ke kaŭzo de la malfacilaĵoj estas kolizio de la diversaj pensmanieroj, ĝenerale tro "okcidentaj" kaj malfacile kunfandiĝeblaj ĉe la loka loĝantaro.

DUM SIA VIZITO al Ĉinio kiel prezidanto de la itala-ĉina instituto por la ekonomiaj kaj kulturaj intersanĝoj, hon. Vittorino Colombo partoprenis la 20-an de novembro, laŭ sia peto, en meso celebrita de la ĝenerala vikario p. Wang Ki-ting en la katolika Pekina katedralo. Kelkaj el la itala grupo komuniĝis kune kun dekdu ĉinaj katolikoj, inter kiuj maljuna pensita fratino. Sekvis interparolo dum pli ol unu horo, kun interŝanĝo de informoj kaj de vidpunktoj pri la pozicio de la katolika eklezio en Ĉinio. La prezidanto de la "Katolika patruja asocio" kaj alia pastro akompanis la italojn, inter kiuj estis ministro Antonino Restivo, al la katedralo, dediĉita al la Senmakula Virgulino, (konstruita antaŭ 320 jaroj). Oni celebris la meson en la latina lingvo. Vittorino Colombo informis pri la postkoncilaj novaĵoj, aparte pri la meso en la naciaj lin-

gvoj, kaj la ĝenerala vikario informis pri la katolika komunumo en Ĉinio. Li deklaris, ke la ĉina katolika komunumo "liberiĝis el la Vatikana subpremado" kaj administras aŭtonome siajn religiajn aferojn. Vittorino Colombo rimarkis, ke se oni povas kompreni sendependon en la organiza strukturo de la ĉina eklezio rilate al la alilandaj eklezioj, ne estas kompreneble, kiel povas ekzisti unueco de katolika eklezio sen kunigo - "eĉ se oni ne volus paroli pri Vatikano - almenaŭ kun la papo". La respondo estis, ke la ĉina eklezio plenumas sian religian agadon "laŭ la evangelia spirito" ...

LA HINDA parlamento rifuzis peton kontraŭkonvertoj al kristanismo, prezentita de la gvidanto de la kontraŭkristana partio Jan Sangh. La peto kontestis la mian organizadon, asertante ke ĝi, pretekste de instruado, vaste prozelitadas. La rifuzo, flanke de la Parlamento, estas pruvo de la sincero en la asertoj faritaj la 24-an de junio, de la hinda ambasadoro al la papo, kiuj garantiis la religian liberecon en la laika hinda ŝtato. "La kristanoj de Hindujo, deklaris la ambasadoro, donis gravan helpon en la riĉa mozaiko de la socia kaj kultura vivo en la lando. Ankaŭ en la eduka kaj humaneca kampoj ilia kontribuo estis aparte notinda kaj signifoplena. Tamen, kvankam ĉefministro s.ino Indira Gandhi ĉiam defendis religian liberecon, kelkaj ŝtatoj aprobis leĝojn kontraŭajn al konverto el hinduismo al kristanismo. La granda nombro da tiuj konvertoj revigligis la hinduan opozicion.

ABONKOTIZO: £. 1.000 (Us.dol. 1,60)

Poŝtgirkonto 3-7791 al: D.ro C.C.Ferrari

aŭ pĝk. al: 1-37638 - P.Giacinto Jacobitti